

LA BAPTO

Ĉu havas sencon nuntempe ankoraŭ bapti? Tiel demandas certe multaj gepatroj eĉ tiuj, kiuj pri tiuj ĉi faktoj konsideras. Ŝajnas, ke preskaŭ estas egale, se iu estas baptita aŭ ne. La baptitoj kaj ne baptitoj vivas sian vivon kaj ne unufoje la homo ekpensas, ke en tio estas neniu diferenco, kial do ankoraŭ hodiaŭ bapti? Se mi preterlasos, ke la bapto estas granda Dia graco, kiu efikas en la vivo de la baptito, eĉ se kun ĝi tiu homo ne kunlaboras, do la principa diferenco inter la baptito kaj ne baptito ekestas en la momento de la morto. La bapto estas la enirbileto en la ĉielon. Se iu laŭ la bapto vivis, tio signifas, ke li forrifuzas malbonon kaj fidas al Dio – do vivas kiel amiko de Dio, poste lin atendas brilega elekto – la eterneco.

Estas klara, ke Dio havas certe ankaŭ aliajn kromordinarajn eblecojn, danke al kiuj Li povas savi por la ĉielo eĉ iun, kiu tiun ĉi enirbileton de la bapto ne havas. Sed estus tre aŭdaca kalkuli kun tio, ke ĝuste por mi aŭ mia infano validos tiu ĉi escepto. Malebla tio ne estas, sed lasi la plej gravan aferon en la vivo – la eternecon – pendi sur tiel necerte ebla privilegio, estas tre malsaĝa. Tial decidiĝi por la bapto kaj la vivo laŭ ĝi estas en la plena senco de la vorto brilega decido.

Krom pluaj avantaĝoj, kiujn la baptito

havas, meritas la aludon ankoraŭ tio ĉi: Al la homoj ŝajnas, ke en la mondo ekzistas multe da malbono kaj ofte, ke ĝi eĉ superas la bonon, sed fakte Jesuo Kristo jam venkis la malbonon, kaj lia venko estas senkondiĉa kaj nerefutebla. Ĉiu malbono estas ĉi tie nur dumtempa, kaj tiuj, kiuj iros kun ĝi, estas sur la flanko de la venkitoj. Per la bapto la homo envicigas sin inter la venkintojn, sen siaj meritoj li povas havi utilon el grandioza venko de Kristo, kiu koncernas ĉiujn, kiuj pere de la bapto kaj la vivo laŭ ĝi estas liaj amikoj.

Kiu el vi ne volus estis en la venka teamo? Per la bapto ni estas en ĝin envicigitaj. Dependas nur de ni, ĉu ni tiun ĉi kuniĝon kun Kristo konservos.

Esti venkinto estas brila elekto. Certe estus ebleco aldoni ankaŭ pluajn motivojn, kial estas taŭga akcepti la bapton kaj vivi laŭ ĝi.

Ni pripensu tion, en tiu ĉi spirito ni estimu nian bapton kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas baptitaj, ke danke al ni ceteraj povu ekkompreni, kiel grandega ŝanco kaj brilega elekto al ili pere de la bapto estas proponata. Ni vivas en la periodo de la graco, kiu ne estas senfina. Tial ni eluzu proponitan ŝancon kaj denove ni malkovru la bapton. ■

Sac. Marek Dunda, Vranov nad Dyji